



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La kosma brilo de la
terglobo

Martinus:

Sopiro

Martinus:


La estonta kompreno
pri la viva estulo

Martinus:

Mistiko aŭ scienco?

Javier Romero:

De la unua al la centa.
De "Boulogne-sur-
Mer" al "Lille"



© Martinus Institut 1981

Reg. 27

La kosma brilo de la terglobo

de Martinus

La simbolo montras la terglobon kaj ĝian konscion. Ni vidas, ke ĉirkaŭ la fizika terglobo troviĝas iom detala aŭro aŭ glorkrono. La blanka krucforma parto de la glorkrono simbolas la tutan homecon en la homaro, kaj tio estas ankaŭ la homeco en la menso aŭ konscio de la terglobo.

Ordinare tiu aŭro aŭ glorkrono radias al ĉiuj flankoj. Ĝia kruca formo simbolas nur tion, ke tiu aŭro prezentas la perfektan aŭ finan flankon de la homaro, kaj sekve la flankon de la konscio de la tero. Ĝi prezentas la komenciĝantan kosman konscion en la strukturo de la tero, kiel ankaŭ en la strukturo aŭ psiko de la tera homo. Al tiu glorkrono de konscio apartenas ĉio en la plenumo de la amleĝo.

Temas pri ĉio apartena al la nocioj paco kaj harmonio, ĉio apartena al altruismaj manifestadoj, ĉio esprimanta juston, kompaton kaj pardonon de maljusto, ĉio esprimanta simpatian aŭ amon – ankaŭ al tiuj, kiuj estas malamikaj aŭ netoleremaj, kaj kiuj havas malsimpatian aŭ sentas malamon al ni. Temas pri ĉio, kio celas al pacmovadoj, kontraŭmilitismo kaj forigo de milito, ĉio laboranta por internacieco kaj por konduki ĉiujn ŝtatojn de la tero antaŭen al konsistigo de unu ŝtato aŭ tutaĵo por komunaj ĝojoj kaj beno por ĉiuj estuloj de la tero. Ĝuste tiu mondregno, kiun kreas ĉiuj ŝtatoj de la tero en simpatio kaj amo, fariĝas la komenciĝanta “ĉiela regno” sur la tero.

La tute malluma figuro ĉirkaŭ la blankaj radioj simbolas la bestan parton de la konscio de ĉiuj nefinaj teraj homoj kune. Ĝi simbolas ĉion, kion ni

konas kiel malamon, amaron, koleron, ekscitiĝon, senamon kaj egoismon, ĉion kion ni konas kiel kalumnion kaj persekuton al la proksimulo. Ĝi simbolas ĉian malbonon kontraŭ vivaj estuloj, bestoj kiel homoj, ĝi simbolas ĉion apartenan al viandomanĝado aŭ ĝuado de animala nutraĵo, ĉion apartenan al ĝuado de alkoholo, narko kaj aliaj venenaj ĝuiloj, ĉion apartenan al la malfeliĉaj geedzejoj. Memkompreneble apartenas al tio ankaŭ ĉiuj formoj de militoj, mondmilitoj, laborkonfliktoj, strikoj kaj lokaŭtoj ktp. – La malluma parto de la aŭro ĉirkaŭ la blanka aŭro estas do tiu malumo, kiu kreas kataklismon aŭ inferon.

La iom pli hela aŭro ĉirkaŭ la du menciitaj aŭroj estas la ordinara tera atmosfero, kiu konsistas el miksaĵo de la kredoreligiaj kaj materiismaj pensklimatejoj, miksaĵo de disradiado de la bono kaj la malbono de la homaro. Tiu miksaĵo de la aŭro simbolas do la efikojn de la besta kaj la homa pensklimatejoj. Ĝi reprezentas la nuntempan kulturen nivelon de la tero. La malluma aŭro, la besta konduto kaj la besta pensklimatejo reduktiĝas do laŭ la evoluo de la homaro. Laŭ tiu reduktiĝo de la besta naturo en la homaro vastiĝas la homa aŭro, la blanka aŭro en la simbolo, kaj ĝi plenigos la tutan bildon. Tiam la homaro estos perfekta. Kaj tiam la tero estos vera totale perfekta homplanedo, lumanta kaj varmiga loĝloko por estuloj laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27), hejmloko de la amo en la stelplena eterna spaco.

daŭrigo sur paĝo 22

Sopiro

de Martinus



1. La principo de malsato kaj satiĝo

La funkciigaj fortoj malantaŭ ĉia vivtravivado estas avidoj, deziroj kaj sopiroj. Sen avidoj tiu vivoformo kiu nuntempe karakterizas la homaron neniam povus estiĝi. Kaj same ne ekzistus estonteco por la homoj se ilia konscio ne estus plena de deziroj kaj sopiroj. Sed la homoj ja ne kredas ke ĉia normala, natura deziro plenumiĝas. Ili nome ne konas la leĝojn de la vivo, kaj ne scias ke ĉiu deziro kaŭzas ciklon kiu komenciĝas en sopiro pri io, kaj ne haltos antaŭ ol tiu sopiro estos kontentigita. Tion ili ja konas de sia rilato al la manĝaĵo. Ili malsatiĝas pri manĝaĵo, kaj tiu avido kontentigas kiam ili ricevas ion por manĝi. Ili satiĝas, ja kelkfoje eble tiom tro satiĝas ke ili eĉ sentas abomenon kontraŭ tio pri kio ili tiel forte sopiris. Sed malsato kaj satiĝo rilatas ne nur al la fizika nutraĵo. Principe ĉiuj formoj de avidoj, deziroj kaj sopiroj estas precize la samo. Ne eblas ĉesigi la malsaton pri manĝaĵo antaŭ ol iamaniere ĝi kontentigas, kaj tiel estas ankaŭ por ĉiuj ceteraj formoj de avidoj, sopiroj kaj deziroj en nia konscivivo.

2. La cikloj de la deziroj

Multaj homoj protestus kontraŭ tia pensmaniero ĉar ili havas multajn dezirojn kaj sopirojn kiuj neniam plenumiĝis. Ili malesperiĝis, kaj eble eĉ sentas sin fraŭditaj de la vivo ĉar ili nun fariĝis tiel maljunaj sen plenumo de siaj deziroj. Ke homoj povas fariĝi tiel maljunaj sen plenumo de siaj sopiroj kaj deziroj, tio ja

ŝajne ankaŭ ne konformas al la penso ke ĉiuj deziroj kaj sopiroj plenumiĝos. Sed tiel estas nur ŝajne. La kaŭzo estas, ke ankoraŭ la homoj vidas sian vivon nur en eta, loka perspektivo kiu komenciĝas per la gravediĝo kaj naskiĝo kaj finiĝas per la morto. Ili kredas ke ilia vivo estas kiel rekta linio kun komenco kaj fino. Sed kiel ĉiuj aliaj rektaj linioj tiu “rekta linio” estas nur iluzio. Efektive la rekta linio ne ekzistas. Ĉiu ajn linio estas esprimo de forto aŭ energio, kaj ĉiu energio en la universo moviĝas en cikloj. Tre malgrandan parton de granda cirklokurbo ni vidas kiel rektan linion. Pensu nur pri la horizonta linio de la maro kiun nia fizika okulo vidas kiel rektan linion, kvankam nia cerbo diras al ni ke ĝi estas parto de granda cirklokurbo. Ankaŭ nia vivo estas parto de ciklo.

Ekzistas io antaŭ la gravediĝo, kaj ekzistas io post la morto, kaj tiu “io” aŭ tiu vivdisvolviĝo antaŭ kaj post la fizika vivo estas same kiel tiu bazita sur la principo de malsato kaj satiĝo, sur la avidoj, deziroj kaj sopiroj de la viva estulo. Ĉiuj tiuj avidoj, deziroj kaj sopiroj troviĝas en iu aŭ alia stadio de la ciklo de malsato kaj satiĝo, kaj plejofte ili daŭras tra pluraj enkarniĝoj ĝis ili finos sian vojon. Tiam la okazinta satiĝo aŭ kontentiĝo estigas sopiron pri io kio iamaniere kontrastas al tio de kio oni satiĝis. Per tio komenciĝis por la viva estulo nova ciklo, nova vario de la principo de malsato kaj satiĝo.

Niaj deziroj kaj sopiroj, eĉ la plej ordinaraj kaj ĉiutagaj, laŭvice moviĝas en

cikloj tiamaniere ke temas pri spiralaj cikloj. Unu ciklo estas kunligita kun la sekvanta kaj fakte fariĝas kaŭzo de ĝi. La tuta vivo konsistas el tiaj cikloj ekde tiuj sopiroj kaj deziroj, kiuj kontentiĝas tre mallongtempe, ĝis tiuj kiuj etendiĝas dum miloj, ja milionoj da jaroj.

3. La mova forto malantaŭ la teknikaj kaj sciencaj triumfoj de nia tempo

Kial la homoj nuntempe iĝis la fortojn de la naturo labori por si? Kial ni loĝas en komfortaj domoj kiuj ŝirmas kontraŭ vento kaj pluvo, kiuj povas esti varmaj en la vintro, kaj kie ni povas ŝalti lumon kiam mallumiĝas? Kial ni povas flugi en la aero kaj ŝipi kaj sur kaj sub la surfaco de la akvo, kaj kial en multaj aliaj manieroj ni povas rapide movi nin tra la spaco? Ĉar ni deziris tion! Ni sopiris atingi tian regadon super la fortoj de la naturo. Sed kiam ni povis havi tiujn sopirojn kaj dezirojn? Kompreneble tiam, kiam ni ne havis la teknikajn kaj sciencajn spertojn kiel nun. Kiam ni estis primitivaj ŝtonepokaj homoj kiuj necese vivis en la mallumaj kavernoj kaj necese batalegis senespere por konservi la vivon, tiam estiĝis la unuaj sopiroj pri pli sendependa vivo, kie oni ne tiel facile cedas al la superpotenco de la naturo.

La ŝtonepokaj homoj kompreneble ne havis kapablon deziri por si elektran lumon, aŭtomatan varmigon, aŭtomobilojn, flugmaŝinojn ktp. Ĉiuj tiuj detaloj en la bildo de civilizo estiĝis nur en postaj tempoj en la mondo de deziroj kaj revoj de la homo. Tio okazis laŭ ĝia akiro de teknikaj kaj sciencaj spertoj. Sed la sopiro pri vivo en kiu estas venkitaj ĉiuj “demonaj” fortoj, kontraŭ kiuj la homoj devis batali en la naturo, tio estis tiu mova forto kiu kaŭzis la teknikajn kaj sciencajn triumfojn de nia tempo. Tio ne signifas ke tiuj deziroj kaj sopiroj simple herediĝis de generacio al generacio. Tio estus ja tute maljusta, kaj laŭ

kosma vidpunkto ne ekzistas maljusto en la universo. Imagu ke la ŝtonepokaj homoj kaj aliaj pratempaj homoj sopirantaj pri nur eteta agrablo en la vivo, simple devus morti sen iam ajn sperti nur oneton de tiuj agrablaĵoj. Kaj se la homoj de la nuna tempo neniam antaŭe vivis kaj sekve ne kapablis havi ian ajn deziron aŭ avidon pri komforto aŭ agrablo, tiam ili tamen devus naskiĝi al la helpiloj kaj teknika povo de nia teknika tempo. Do iuj kiuj tre altgrade sopiris pri pli agrabla vivo devus morti sen iam ajn travivi ĝin, kaj iuj kiuj neniam havis tiajn dezirojn kaj sopirojn devus tute senmerite ricevi ĝin. Tio estus ja terure maljusta. Sed tiel ankaŭ ne estas. La ŝtonepokaj homoj kiuj sopiris venki la naturfortojn kaj per tio ricevi pli bonan vivon, estas la samaj kiel tiuj modernaj homoj, kiuj iom post iom atingis tian vivon koncerne la pure fizikajn kaj praktikajn aferojn.

4. Nuntempe la homoj vivas en intelektigita, ŝtonepoka mondo

La suferoj kaj spertoj de multaj enkarniĝoj troviĝas malantaŭ la tutaj, modernaj civilizo kaj kulturo. Sed tiuj suferoj kaj spertoj ne sufiĉas, ĉar en tia kazo la kulturo kaj civilizo de nia tempo estus multe pli humanaj kaj multe pli bazitaj sur proksimula amo kaj divido de la bonaĵoj, ol ili estas. La beste karakteriza menso de la ŝtonepoka homo daŭre influas ankaŭ nian nuntempan kulturon. Kio alia estas la grandaj militoj kun la giganta disvolviĝo de rafinitaj, teknikaj armiloj ol plilongiĝo de la primitiva ŝtona hakilo de la ŝtonepoka homo, de liaj jetlanko, pafarko kaj sago? En la nuna tempo la homoj vivas en intelektigita, ŝtonepoka mondo. Por ili kontentiĝis multaj sopiroj kaj deziroj, kaj ĉiuj tiuj cikloj de malsato kaj satiĝo fakte estas evoluo de pli besta al pli homa stato. Sed por vere fariĝi homoj, kiel ili nomas sin, la teraj homoj necese

komencu novajn ciklojn de sopiro, kiuj en venontaj tempoj povos moviĝi laŭ sia vojo al plenumiĝo, kaj tion multaj homoj sur la tuta tero jam faris. Paco sur la tero estas tio pri kio ili sopiras.

5. La sopiro pri paco estas la komenco de tute nova epoko en la historio de la homaro

La sopiro pri paco daŭre fortiĝas en la konscio de pli kaj pli da homoj. Sed kiel tiu sopiro povis estiĝi? Ekskluzive nur ĉar la teraj homoj estas satiĝantaj de la malo de paco, la milito. Por la ŝtonepokaj popoloj, por la malnovaj vikingoj kaj por aliaj el la militpopoloj de la pasinteco la milito estis idealo. Ili batalis kontraŭ la naturo, kaj ili batalis kontraŭ aliaj homoj. Laŭ ilia religia sinteno morti sur la batalejo estis heroa faro kiu kondukis la militiston rekte al la paradizo. La viroj havis la avidon esti grandaj herooj kaj militistoj, kaj la virinoj admiris nur tiujn virojn kiuj estis tiaj. Tiaj deziroj kaj avidoj funkciigis multege da cikloj, kaj milionoj da viroj fariĝis militeroj, kaj ili venkis kaj malvenkis kiel herooj. Kaj milionoj da virinoj spertis ke tiuj herooj batalis por ili kaj pri ili. Sed nun tre grandparte tiuj herooj kaj heroinoj de la pasinteco estas satiĝintaj de tiu formo de vivo. Ili tiom tro satiĝis ke ili nomas ĝin “la infero de la milito”, kaj tio estas la komenco de tute nova epoko en la historio de la homaro.

6. Malnova mondkulturo troviĝas en pere, kaj nova mondkulturo ĝermas inter ĝiaj ruinoj

Male al la infero de la milito oni povas nomi tiun novan epokon “la ĉiela regno”, kiu estas la samo kiel mondo de paco. La kaŭzo ke Kristo diris: “La ĉiela regno troviĝas ene de vi”, estis ke per sia kosma konscio li konis la tutan evoluproceson. Li vidis kiel la homeco en la homo kreskis malrapide, kaj li havis la

mision nutri tiun etan ĝermon de paco kiu kreskis kiel sopiro en la menso de multaj homoj. Dum la ĉ. 2000 jaroj kiuj pasis post la vivo de Kristo sur la tero, daŭre pli kaj pli grandaj kaj pli kaj pli ampleksaj militoj, ja eĉ mondmilitoj, furiozas inter la homoj. La tero fariĝis infero kie la homoj povas sperti pli terurajn aferojn ol tiuj inferaj imagoj kiujn kreis religiaj fanatikuloj. Sed tio ja estas la sola kio povas igi la homojn forturni sin de la milito. Nun la praktikado de la mortiga principo estas tiel giganta, ke nuntempe troviĝas ĉe la plej multaj homoj grandega sopiro pri paco sur la tero. Tiu sopiro troviĝas ankaŭ ĉe tiuj militistoj kiuj nuntempe batalas sur la batalejoj. Ili neniel deziras esti militeroj. La kaŭzo ke ili nun troviĝas sur la batalejoj estas deziroj kiujn ili havis antaŭe. Tio estas ciklo kiun ili mem estigis, kaj de tiu ili nun spertas la lastajn konsekvencojn. Malnova mondkulturo konstruita el la homaj sopiroj en la pasinteco estas pereanta, kaj nova kulturo ĝermas inter ĝiaj ruinoj. Tiun novan kulturon devas ja krei ankaŭ tiuj estuloj kiuj iam estis ŝtonepokaj homoj, kaj ĝi brilos de beleco kaj spirito, de genia arta kaj teknika agado kiu ne estas lukso por superklaso, sed natura vivdisvolviĝo kaj vivtravivado por ĉiuj homoj de la tero.

7. Kaŭzo kaj efiko, aŭ sorto

Mi finos parolante pri tio, kiel la unuopa homo povas per siaj sopiroj kaj deziroj ekhavi influon al tiu granda proceso de transformiĝo kiu okazas por la tuta homaro. Oni povas ofte aŭdi ke homoj opinias ke tio, kion la unuopa homo pensas, diras kaj faras en la ĉiutago, havas nur malgrandan signifon, ke almenaŭ estas nur “la granduloj kaj fortuloj” kiuj havas influon. Sed tio ne estas ĝusta. Almenaŭ dependas de la signifo de “grandulo kaj fortulo”. Ĉiu unuopa homo kaj ĝiaj sopiroj kaj deziroj

havas signifon por la tutaĵo. Antaŭe mi rakontis ke la terglobo estas viva estulo, en kies fizika organismo la homaro kiel tutaĵo formas tiun organon kiu estas komparebla kun la cerbo en nia propra organismo.

La unuopaj homoj estas do speco de cerboĉeloj en la fizika organismo de la terglobo, kaj por la tutaĵo absolute ne estas sen signifo kiuj energivibroj eliras de la unuopaj partoj de tiu tutaĵo. Ne estas sen signifo pri kio la unuopaj homoj sopiras, kaj ankaŭ ne kion ili faras por ke iliaj sopiroj iom post iom plenumiĝu.

Ke nun eblas por la homoj atingi teorian superrigardon pri sia vivo rilate al estintaj kaj estontaj enkarniĝoj, tio donas al ili okazon kompreni ke ili mem kreis tiujn kondiĉojn sub kiuj ili nuntempe vivas, kaj tio okazis pere de tiuj avidoj, deziroj kaj sopiroj kiuj igis ilin pensi kaj agi kiel ili faris en la pasinteco. Pensoj kaj agoj estas forto kaj energio, kaj ĉia energio en la universo iras en cikloj kaj formas kaŭzon kaj efikon aŭ sorton. Estas la sopiroj, deziroj kaj avidoj de la pasinteco kiuj kreis la nuntempan sorton de la homoj. Sed la homoj daŭre kapablas krei sorton, ĉar nuntempe ili kreas sian estontecon rilate al tio kion ili travivos en la vivo post la morto kaj en venontaj fizikaj enkarniĝoj Tion, pri kio ili sopiras, ili travivos tuj kiam ilia sortostrukturo donos lokon por tiuj travivaĵoj. En la granda, kosma ciklo neniu homo travivos pli da feliĉo, aŭ pli da sufero aŭ akcidento ol travivos iu ajn alia. La providenco ne havas favoratojn, kaj ankaŭ neniu devas esti ĉefa suferanto. La propraj sopiroj de la vivaj

estuloj movas ilin antaŭen en la evoluo, kio signifas tra la multaj diversaj pensklimatoj de la spertoj al novaj sopiroj kaj novaj travivaĵoj.

8. La homo devas lerni konformigi siajn sopirojn kaj dezirojn kun la eternaj leĝoj de la universo

Malantaŭ ĉiuj sopiroj kaj ilia plenumiĝo ekzistas ĉe la viva estulo ĝia eterna mio kun la praavido krei kaj travivi daŭre novajn variojn de la eterna ciklo de la materio. Kiam Kristo diris al la homoj: “Vi estas dioj”, tiam tio estis esprimo de kosma klarvido, ĉar la homo havas diajn eblojn kiam ĝi lernas konformigi siajn sopirojn kaj dezirojn kun la eternaj leĝoj de la universo, kaj tio signifas kun tiu amo al ĉio kaj ĉiuj, kiu estas eterna rilate al tiu Dio kun kiu ni estas unu pro nia mio, nia kreokapablo kaj pro tiu materio en kiu ni kreas. Nur kiam per siaj sopiroj, kaj per la el tiuj kreskanta kaj kreanta disvolviĝo la homo ne plu kreas militon kaj inferon ĉirkaŭ si, sed elradias la pacon de sia interno per ĉio kion ĝi diras, pensas kaj faras, nur tiam ĝi fariĝos kapabla ankaŭ tagokonscie travivi sian unuecon kun la universo kaj la eterna Dio.

Tiuj sopiroj kiuj tiam estiĝos en ĝia kosma konscio, faros ĝin dieca artisto kaj teknikisto el formato kiun la terhoma fantazio apenaŭ povas imagi. Kaj por ĉiuj homoj de la tero estas tiel, ke iam ili havos tiajn sopirojn.

Prelego 20.11.1941. En kontaktletero n-ro 11, 1959 kaj denove en dana Kosmos n-ro 15, 1974 prilaborita en dana lingvo de Mogens Møller kaj aprobita de Martinus. (Esperantigita de Ib Schleicher en 1996).

La estonta kompreno pri la viva estulo

de Martinus



1. Kosmaj “fakuloj kaj metiistoj” en la universala kreoproceso

Karaj amikoj! Mi volas paroli al vi pri tio, kiel oni komprenos la vivan estulon en la estonteco. Estas absoluta premiso, ke oni ekhavos alian komprenon pri la viva estulo, ol oni havas nun; ĉar ne eblas krei novan kulturon surbaze de la kompreno pri la viva estulo, kiun la homoj ĝis nun havas. Se ni esploras ĉi tiun komprenon pli proksime, montriĝas, ke ordinara homo kalkulas kun tio, ke la homo estas la plej alta estulo, kaj, krom tio, ankaŭ povas konsenti kun la opinio, ke bestoj kaj plantoj estas vivaj estuloj, sed la mineralojn, la fortojn de la naturo, la planedojn ktp, ĝi rigardas kiel “mortaj”, “senvivaj” objektoj. Sed la homoj de la estonteco havos tute alian sintenon, ĉar nia opinio pri kio estas viva, same kiel ĉio alia, transformiĝas de stato malpli perfekta al pli perfekta. Kiam ni esploras la vivajn estulojn, ni vidas, ke ili aperas kiel plej diversaj specioj, kaj pli profunde pripensinte, ni komprenas ke necesas ke tiel estu, ĉar se ili ne aperus kiel diversaj specioj, tute ne estus kontrastoj, kaj sen kontrastoj, tute ne ekzistus io, kion eblus nomi “vivo”. Kiam ni ĉirkaŭrigardas, ni povas observi, ke konstante okazas kreado; estas la kreiĝo de la universo, estas energidisvolvo. La energidisvolvo de la estuloj estas tre diversa, kaj ĉar ĉiu formo de energidisvolvo postulas sian specialan ilon, la estuloj devas aperi laŭ malsamaj aspektoj. Ĉiuj estuloj do

estas specialaj iloj en la granda kreiĝo, kiu nin ĉirkaŭas. Ekde la plej malgrandaj mikroestuloj kaj supren ĝis la plej grandaj makroestuloj, ili ĉiuj reprezentas tute specialan formon de energidisvolvo. Rilate al la homoj, ili manifestas tiun formon de vivo, kiun ni nomas la homa vivo, kaj per tio ili realigas specialan parton de la daŭrigado de la universo. Same, la bestoj, plantoj, mineraloj, ĉeloj, molekuloj, atomoj ktp havas kiel taskon realigi ĉiu sian specialan parton de la daŭrigado de la universo. Tio validas por ĉiuj vivaj estuloj, planedoj, sunoj, galaksioj ktp. Ĉiu ajn viva estulo reprezentas iun aŭ alian formon de ilia stato kaj estas ilo por speciala formo de energidisvolvo. Alivorte, tio signifas, ke ĉiuj vivaj estuloj fariĝas iaspecaj kosmaj “fakuloj” en la konstruo de la vivo. Same kiel oni en la materia kreado bezonas masonistojn, forĝistojn, bakistojn, ŝuistojn ktp, ja ĉiaspecajn metiistojn kaj laborantojn, por ke la moderna socio povu funkcii, oni ankaŭ en la granda universala kreoproceso, kiun ni partoprenas, bezonas specialajn kosmajn “fakulojn kaj metiistojn”. Kaj ĉar ni ĉiuj havas ĉiu sian specialan kosman “fakon”, pri kiu ni okupiĝas, kaj kiu estas absolute necesa kaj nemalhavebla en la granda kreoproceso, ni do ĉiuj estas diversfakaj kosmaj “fakuloj”. Ni do vidas, ke ankaŭ en la granda universala kreoproceso oni devas havi plej diversajn kosmajn fakulojn. Jen ni povas konstati la kaŭzon, pro kiu la vivaj estuloj aperas tiel diversaj.

2. Ĉiuj estuloj estas ekzakte tiaj, kiaj ili ĝuste nun estu

La viva estulo konsistas interalie el mio kaj superkonscio. Ĉi tiuj du realaĵoj konsistigas la senmortan parton de la viva estulo. Krome ĝi havas fizikan organismon, kiu male ne estas eterna realaĵo, sed la principo tamen estas eterna. La viva estulo havas konstantan kapablon konstrui novan organismon, ĉiufoje kiam la malnova estas eluzita. La fizika organismo estas io, kio konstruiĝas el materio, sed la superkonscio malantaŭ la organismo estas eterna realaĵo, en kiu la viva estulo tenas ĉiujn kapablojn kaj talentojn, kiuj estas bezonataj por konstrui novan organismon. Ni ĉiuj estas nemalhaveblaj iloj en la granda kreoproceso, kaj sekve la tutaj ja estas perfekta. Unuope ni ĉiuj estas tiaj, kiaj estas plej utile por la universo en tiu ĉi momento. Sed tio ne signifas, ke ni nun estas tiaj, kiaj ni estu en la estonteco. Hodiaŭ ni ne estas tiaj, kiaj ni estu morgaŭ. Ni tutan tempon ŝanĝiĝas, sed en tiu ĉi momento ni estas ĝuste tiel perfektaj kiel eblas surbaze de la pasinteco kaj kun konsidero al la estonteco. Sed kiam estas tiel, oni ne povas, se oni volas esti en kontakto kun la vivleĝoj, kritiki la homojn pro iliaj agmanieroj, ĉar ili estas en stadio en kiu ili ne povas havi alian sintenon ol tiun, kiun ili havas. Sed tio ne signifas ke ili pluhavos tiun sintenon kiun ili nun havas; tio nur signifas, ke ĉiuj vivaj estuloj devas stari sur la evoluŝtupo sur kiu ili staras, ĉar se ili ĉiuj estus same progresintaj, estus tute maleble travivi iun ajn formon de vivo.

Tio, kio ebligas ke ni entute povas travivi la vivon, estas ke ĉiu ajn formo de manifestado, de kreado, havas kiel premison malkonstruproceson kaj konstruproceson. Kiam io kreiĝu aŭ konstruiĝu, io alia devas malkonstruiĝi. Tio estas eterna principo en la vivo. Tiuj du procesoj, malkonstruo kaj konstruo,

devas ekzisti, alie nenio estus spertebla – eĉ ne penso povus ekesti. Tio kion ni nomas vivo, estas simple la funkcio de tiuj ĉi du principoj – malkonstruo kaj konstruo. Se oni konstruu domon sur loko, kie jam situas alia domo, oni devas unue forigi ĉi tiun, por ebligi la konstruon de la nova. La malnovan domon oni devas forigi kaj tiu ĉi forigado estas malkonstruproceso. Oni forigas ion kio estas obstaklo, oni preparas ĉi tie konstruon. Kiam ĉia konstruo estas bazita je tiu ĉi principo, estas klare, ke kelkaj estuloj estu iloj por la malkonstruo kaj aliaj estuloj estu iloj por la konstruproceso. Ni ankaŭ vidas ke la estuloj havas talentojn por tiuj ĉi du procesoj. Tio kio nun validas por la homoj, estas kulminanta malkonstrua proceso.

3. La kreado de “nova ĉielo” kaj “nova tero”

Ni hodiaŭ spertas la plej grandan manifestiĝon de tio, kion mi nomas la mortiga principo. Ni povas observi ĉiujn formojn de mortigo, tute malsupren ĝis kalumniado. Klaĉado kaj kalumniado estas maldensigita murdo. Ĉiu ajn formo de malbonfaro al sia proksimumo estas malkonstruproceso, ekde cent-elcenta murdo kaj malsupren ĝis la venena komento, kiu simple estas maldensigita mortigo. Sed ĉi tiu malkonstruproceso estas necesa ene de certa kampo, kaj ni ankaŭ vidas, ke tre altgrade disvolviĝas malkonstruproceso nuntempe en formo de milito kaj detruado. Neniam pli frue en la historio de la tero okazis tiel impona malkonstruproceso kiel tiu, kiu okazas dum ĉi tiuj jaroj. Nuntempe la milito kovras la tutan teron, sed per analizo de ĉi tiu granda gamo da malkonstruaj fortoj, ni vidos, ke tio servas aman celon. Ĉi tiu granda malkonstruproceso devas plenumiĝi antaŭ ol oni povos komenci la grandan konstruproceson. Ĉi tiun konstruproceson predikantoj predikis kiel la kreadon de “nova ĉielo”

kaj “nova tero”. La “nova ĉielo” identas kun nova mensa stato, nova formo de konscidisvolvo, kaj “nova tero” signifas, ke poste oni kreos tute novan administradon de la valoroj de la tero, kio sekve signifos kompletan transformiĝon de la socia strukturo. Ĉio, kio hodiaŭ okazas en la mondo, servas sole nur ĉi tiun altan celon. Amaso da mensaj kaj fizikaj miskomprenoj estas forigendaj de la mondo. La homoj devas liberiĝi de siaj malĝustaj imagoj pri la vivo. Sed ĉi tiuj imagoj ne estas forigeblaj sen malkonstruproceso konsistanta el tio, kion ni nomas milito, doloro, mallumo, peko aŭ “la malbono”. Plej profunde tio ne rilatas al “malboneco”; nek tio, kion ni nomas la “malbono”, nek tio, kion ni nomas “peko”, ekzistas en la reala mondo.

4. Kelkaj estuloj estas iloj por malkonstruo, aliaj por konstruo

Kiel mi jam diris, nenio povas esti alia ol ĝi ĉiumomente estas. Se ne estus tiel, ne ekzistus prepariĝo por io pli bona. Estas necese, ke oni venu al kompreno, ke iuj estuloj devas esti iloj por malkonstruo kaj aliaj por konstruo. La Providenco devas havi stabon de kosmaj “fakuloj”, kiuj en si mem posedas la kapablon manifesti la diversajn metodojn de la mortiga principo. Tio ĉi ne signifas, ke evoluinta homo nutras timon pro necerteco pri kiuj potencoj venkos en ĉi tiu granda ludo. Tia timo apartenas nur al homoj kun tre limigita konscio. Tiel longe kiel oni ankoraŭ ne estas klara pri tio, kio okazas, oni timas tiom da aferoj. Sed tiu timo estas superflua. Alia afero estas, ke ni mem eble ne kapablas manifesti la mortigan principon. Sed tio ja nur indikas, ke ni estu iloj por la konstruaj fortoj. Ĉiu havas sian lokon en tiu ĉi granda proceso de malkonstruo kaj konstruo, laŭ la fortoj kiujn ni kapablas manifesti. Sed tio validas ne nur por homoj; tio validas por ĉiuj vivaj estuloj. Tion ĉi ni povas vidi en nia

propra organismo. Nia korpo konsistas el nenombrebla kvanto da vivaj estuloj. Nia sango, nia muskolaro, niaj organoj, ĉio konsistas el vivaj estuloj. Nian utiligon de niaj sensoj povigas vivaj estuloj. Iuj mikroestuloj povigas nian gustosenson, aliaj nian flarsenson, kaj ankoraŭ aliaj nian aŭdsenson ktp. Ni ne povas manifesti eĉ la plej malgrandan spireton aŭ la plej malfortan flustron sen ke tion povigas stabo da vivaj estuloj, al ni disponeblaj. Ili estas iloj por ni, kaj ekzakte tiel estas ankaŭ en la granda kosmo. Ankaŭ tie granda vivtravivado okazas kun la helpo de vivaj estuloj. Per nia vivado, ni partoprenas kiel sensiloj de Dio en tiu proceso.

5. La hodiaŭa homo sopiras al vivo en lumo kaj amo

Tie kie ni hodiaŭ troviĝas, ni havas certajn dezirojn kaj sopirojn, kaj tiuj ĉi realaĵoj decidas nian lokon en la granda malkonstru- kaj konstruproceso, kiuj nun plenumiĝas. Se nia interna mondo estas en malharmonio kun la malkonstruaj fortoj, ni estas malbona ilo en la servo de tiuj fortoj, kaj pro tio estas tute nature ke ni transiras al iĝi ilo en la servo de la konstruaj fortoj. Ni ne estas por ĉiam ligitaj al certa sfero aŭ nivelo, sed povas libere iri de unu stato al la alia. Milito, mortigo, murdo kaj kripligo, ĉiuj formoj de manifestado de la mortiga principo estas same necesaj kiel la feliĉaj statoj, sed ni ne estas ligitaj al tiuj ĉi statoj krom laŭ sinsekvo laŭgrada. Estas tiu ĉi laŭgrada sinsekvo kiun mi nomas “la evoluŝtuparo”. En ĉiu evoluspiralo ni komencas en la mineralregno, iĝas plantoj, bestoj kaj nun homoj. Ni pluiras al eĉ pli altaj vivstadioj. Ĉiu vivo kreskas de primitiva stato al ĉiam pli perfektaj statoj por kulmini en la agrablega mondo de la intuicio, en kiu nova spiralciklo ekkomenciĝas. La ŝtupo de la evoluŝtuparo, kiun ni hodiaŭ reprezentas, estas esprimo de

ĝuste tio, kion ni antaŭe emis aŭ deziris reprezenti, en la grado ĝis kiu nia sortio tion permesas. Ni ĉiuj staras hodiaŭ sur la ŝtupo, sur kiu, el kosma vidpunkto, estas plej utile por ni stari. Sed dum estas fakto, ke tiu ĉi ŝtupo hodiaŭ plenumas dezirojn kaj revojn kiujn ni havis en la pasinteco, ankaŭ estas fakto ke ni hodiaŭ sopiras al multe pli feliĉa kaj perfekta formo de vivtravivaĵo ol tiu, kiu nun estas al ni donita. Eblas diri ke la tuta homaro de la terglobo satiĝis je milito. La hodiaŭaj homoj ne mortigas aliajn, nur ĉar estas sporto mortigi. Kiam tamen estas tiel ke la mortigado por multaj homoj iĝis ilia kosma metio, tiam estas pro tio ke ĉi tiuj homoj pensas ke tio estas la vojo al la paco al kiu ili sopiras. Tio ĉi estas iasence ankaŭ ĝuste, ĉar tiu ĉi paco nur povas aperi per la manifestado de la mortiga principo, sed la homoj, kiuj efektivas la mortigadon, ricevos tre grandan instruon pri tio, ke ne estas agrable esti ilo de tiu ĉi principo. Ĉar la leĝo de la vivo kondiĉas, ke “kiel oni semas, tiel oni rikoltos”, ĉiuj iloj de la mortiga principo mem spertos la efikojn de sia agado. Spertinte ĉi tiujn efikojn, la homoj rigardos multajn aferojn alimaniere. Plensataj je tiu ĉi formo de vivo, ili sopiros al vivo en lumo kaj amo. La lumo aŭ la mensa ekvilibro kaj harmonio iĝos ilia granda celo. Sed por atingi tiun ĉi celon, estas bezonata granda ekaktivado, kaj tiu ĉi kreskanta energidisvolvo estas tio, kion ni momente spertas. Ĝi forte akcelas la evoluon, kaj preparas la homojn por la konstruproceso kiu anstataŭos tion, kio nun okazas.

6. Sen la kontrastprincipo la vivo ne estus travivebla

Ni do staras antaŭ grandega fortodisvolvo en la vivo. Nia ĉirkaŭaĵo disvolvas enorman serion da diversaj elradiadoj de energioj. La tergloba energidisvolvo ekzemple estas tio, kion ni nomas la

naturon, ŝtormo, pluvo, malvarmo, varmo ktp. Ĉiuj tiuj realaĵoj influas niajn sensojn kaj kunkreas nian vivon. Kiam vi kapablos sufiĉe profunde eniri ĉi tiujn aferojn, vi vidos, ke tio, kion vi ĉi tie renkontas, estas iloj de la Providenco por prilabori kaj plibonigi vin mem. Ni ĉiuj estas tutan tempon submetitaj al ŝanĝoproceso, kaj estas tiu ĉi ŝanĝado, kiu igas la vivon interesa. Estas danke al la kontrastprincipo, ke ni spertas la vivon. Sen kontrasto, neniu sensado. Oni ne povas pentri pejzaĝon sur peco da blanka pentrotolo, se oni nur uzas blankajn kolorojn. Kiam ni povas spertion, tio okazas pro la lum- kaj mallumprincipo. Kiam ni vidas homon, estas nur pro tio, ke ĝi reflektas lumon kaj mallumon. Se ni spektas filmon, validas la samo. Tiu sensado de lumo kaj mallumo do estas nia travivado de la kosma malkonstru- kaj konstruproceso, de kio dependas ĉio viva.

7. Ĉiuj vivaj estuloj estas kunligitaj en unu unuo, Dio

Ĉar ĉiuj vivaj estuloj aperas kiel iloj, la homo devas pli aŭ malpli frue veni al la kompreno, ke devas esti io malantaŭ la videbla flanko de tiuj ĉi vivaj estuloj. Ni estas al kutimiĝintaj al tio, ke ili aperas ĉiuj unuope; ni nomas ilin per diversaj nomoj kaj pensas pri ili kiel memstaraj estuloj. Sed en la realo ili ne estas tute memstaraj. Por tio estus bezonata cent-elcente libera volo, kaj tion la tera homo, same kiel la malpli evoluintaj estuloj, ne havas. Ja estas tiel, ke ene de certa regiono, ni havas liberan volon, sed ekster tiu regiono, ni estas komplete dependaj de la cetera universo. Ni ĉiuj estas kunligitaj kaj konsistigas organojn en pli granda organismo; kune ni estas sensiloj por pli alta konscio. Ne devas esti nia planedo aŭ suno. La planedoj ja estas vivaj estuloj, sed ankaŭ ili estas subordigitaj al pli altaj estuloj; ili estas difiloj, same kiel ni mem. Ili kreas

fizikan organismon kaj per tio fariĝas ilo por io alia, kio estas io eterna, kio ekzistas, kaj kio identas kun la mio de la universo mem.

Malantaŭ ĉiuj vivaj estuloj, de la plej malgrandaj ĝis la plej grandaj, ekzistas mio, ankaŭ malantaŭ la plej granda organismo, la universo mem. Tiu mio kunligas ĉiujn vivajn estulojn al unu unuo. Tiu unuo estas Dio. Dio ne manifestiĝas pere de iu “nenio”, sed uzas ĉiujn vivajn estulojn por manifestiĝi. Al Dio, ĉiu estulo estas utila, sendepende de kia ĝi estas aŭ kiel ĝi aspektas. Tio eble sonas strange, sed Dio efektive dependas de ĉiuj vivaj estuloj. Same kiel vi kaj mi devas uzi niajn sensojn por povi ion percepti, Dio perceptas la vivon pere de la vivaj estuloj.

8. La sopiro renkonti la Providencon

La vivaj estuloj estas do la sensiloj de Dio. Estas tiu ĉi kompreno pri la viva estulo, kiun la homoj de la 21-a jarcento havos kiel sian bazon. La viva estulo do estas io multe pli granda, ol kutime pensas la homo. Sed kiam Dio uzas ĉiujn vivajn estulojn por povi krei, tiam ekestas la demando: Per kiuj vivaj estuloj Dio perceptas nin? Por povi respondi tiun ĉi demandon estas necese por ni, ke ni iru iom malantaŭen en la evoluo. Ni scias, ke mortigata besto eligas angoran krion. Tiu ĉi angorkrio estas alvoko al nekonata Providenco. Pli poste en la evoluo ni vidas, ke la tera homo eligas preskaŭ similan krion. Ĝin ni nomas “preĝo”. Kaj la bestoj kaj la naturhomoj instinkte havas la sintenon, ke ekzistas Providenco. Sed pli poste en la evoluo, ĝis la tiel nomata kulturhomo, ni vidas, ke sur tiu ĉi ŝtupo oni neas la ekziston de Providenco, ĉar la ekziston de Providenco ŝajne ne eblas pruvi. Tiu ĉi opinio tamen nur dependas de iluzio. La perceptado de Dio dependas de multe pli ol nur inteligenteca difino. Eĉ la plej

inteligentece evoluinta homo iun tagon sopiros renkonti la Providencon. Tiu ĉi sopiro estas ilustrita en la Biblia rakonto pri la perdita filo, kiu sopiras vidi sian patron denove. Ju pli evoluintaj la homoj iĝas el scienca vidpunkto, des pli kapablaj ili iĝos esplori ankaŭ en spirita materio. Tiu ĉi esplorado igos ilin vidi ĉiujn movospecojn kiel esprimojn de vivo. Per la kompreno ke, ĉio estas vivesprimoj, iĝos fakto, ke malantaŭ la fortoj de la naturo devas ekzisti viva estulo. Studante la enorman planitecon kiun la vivo en la naturo elmontras, oni ekkomprenos ke, tiu ĉi planiteco esprimas konscimanifestadon, kaj sekve oni atingos ekkomprenon pri la ekzisto de Dio kiel realan fakton.

9. Ĉiuj vivaj estuloj estas sensiloj de Dio

Per studado de nia propra organismo ni vidas, ke ĝi ĝis plej malgranda detalo malkovras logikon rilate ĝian kunmetadon kaj konstruadon. Kaj kiel estas ĉi tie, tiel estas ĉie en la vivo. Ĉiu unuopa viva estulo servas per sia speciala utilo en la vivo. Tiu enorma planiteco ne estis kreita de homo. Sekve ni estas devigitaj konfesi, ke ekzistas multe pli alta konscio ol la nia malantaŭ ĉio. Ĉi tiu konscio uzas ĉiujn vivajn estulojn kiel sensilojn. Ni iom post iom spertos, ke Dio estas ĉie-ĉeestanta. Kiam Dio spertas per ĉiuj vivaj estuloj, tio signifas, ke ni nenie povas kaŝi nin de tiu ĉi Dio. Ĉar ĉiuj formoj de materio, kaj la fizika kaj la spirita, estas manifestadoj de la sensiloj de Dio, ni ne povas en ajna maniero eskapi la sensilaron de Dio. Niaj propraj sensiloj apartenas al la sensilaro de Dio, ankaŭ niaj mikroestuloj apartenas al la sensilaro de Dio. Ni ĉiuj estas parto de la sensokapablo de Dio. Ni ne povas ion sperti, sen ke tiu sperto eniras nian superkonscion, sed ĉar nia superkonscio estas parto de la superkonscio de Dio ĝi tuj estas “en Li”. Pro tio ni ne povas

mensogi al Dio, ĉar ni estas eterne lokitaj antaŭ Lia konscio. Kiam ni do per niaj travivaĵoj venas al la kompreno, ke ĉiuj vivaj estuloj estas sensiloj de Dio, kaj ke Dio per ĉi tiuj iloj respondas al nia alparolo al Li, tiam okazas tio, ke ni ŝanĝas nian sintenon al ĉi tiuj iloj. Pro tio, ke tiuj ĉi iloj kune konsistigas ĉion, kion ni nomas “la naturo”, tio signifas, ke nia sinteno al la naturo iĝas alia ol antaŭe. Kiam oni komencas kompreni, ke ĉiuj vivaj estuloj kune konsistigas la organismon de Dio, tiam estas evidente, ke Dio iĝas pli viva por oni ol antaŭe, kiam Li estis io ekster la materio.

10. Malfacilaĵoj estas la plej bona instruisto

Al multaj homoj, la naturo estas io, kontraŭ kio ili devas batali. En nia infana instruado, oni proklamis al ni, ke “la diablo” klopodas tenti la homojn ktp. Sed en tiu formo la kristanismo estas paganismo. Tiel longe, kiel oni konservas tian komprenon pri Dio, tio montras nur, ke oni ne havas realan komprenon pri la vivo. La nuntempa homo havas senteton, ke devas ekzisti Providenco, iu aŭ alia alta estulo, kiu ĉion aranĝas. Sed ili ne havas iun realan komprenon pri tiu Providenco, tiel longe kiel ili kredas, ke la homoj, la bestoj ktp ne estas parto de Dio, sed nur io, kio same bone povas iri al “la infero” aŭ neniigi. Estas evidente, ke tia sinteno devas influi al la volgvitado de la homoj. Kontraŭe, kiam oni komencas veni al la kompreno, ke ĉiuj vivaj estuloj kune konsistigas la korpon de Dio, estas memevidente, ke Dio aperas kiel pli viva. Tiu sinteno donas senkompare pli grandan komprenon pri la vivo mem kaj la ekzistado. Tiel oni komencas ekhavi la saman vivkoncepton, kiel la grandaj saĝuloj. Tute ne eblas, ke Dio povas daŭre esti io nevidebla – iun belan tagon eblos Dion klare percepti. Kaj tiam oni vidos, ke ĉiuj estuloj estas la sensiloj de Dio,

kaj ke ĉio, kio estas manifestata, devas manifestiĝi, ĉar temas pri io nemalhavebla en la granda konstruproceso, en kies mezo ni troviĝas.

Kiam homo tion aŭ alion ne ŝatas, temas pri erara sinteno al la neŝatata afero. Sed kiam la homo komencos povi vidi, ke Dio identas kun ĉiuj estuloj kune, la malŝatata homo aperos kiel ero en la granda konstruproceso. Ekzemplon pri tio vi havas en via propra vivo. Tre verŝajne vi ne ekzakte amis tiujn, kiuj dum via infana edukado devis nei al vi tion, kion vi volis fari, ĉar tiuj homoj povis vidi tion, al kio kondukis tiujn ĉi dezirojn, se ili ne neus. Sed poste, vi certe multfoje sentis dankemon al tiuj, kontraŭ kiuj vi iam koleris. Oni ne amas la malfacilaĵojn, dum oni troviĝas meze de ili, sed ili tamen estas nia plej bona instruisto.

11. Nenio povas esti alia, ol ĝi momente estas

Kiel la vivo estas hodiaŭ, ĝi montras, ke la homo ne havas la sintenon, ke Dio ekzistas malantaŭ ĉio malagrable, kion ĝi travivas. Kiam ĝi travivas ion malagrable, ekzemple senlaborecon, malriĉecon, malsanon aŭ klaĉon kaj venenajn agojn de aliaj homoj, estas fakte Dio, kiun ĝi spertas. Ĉiuj ĉi tiuj malagrablecoj estas en la realo amomanifestaĵoj, sed la homo vidas ilin nur kiel daŭran mallumon, ĝi ne vidas la ĉeestan lumon kaj pro tio juĝas ilin malĝuste. La vivo instruos al ni, ke ni ne povas tuj ŝanĝi nin. Ĉio estas tiel perfekta, kiel ĝi momente povas esti. Vi iam komprenos, ke neniu, absolute neniu, povas esti alia, ol ŝi aŭ li momente estas. La kompreno pri tio ĉi, donos la pacon kaj trankvilon en la animo, al kio vi sopiras. Iun tagon estos evidente por vi, ke ĉio kio okazas en la mondo, ĉio kio ĉirkaŭas vin, estas ĉiuj tiuj sensiloj kiujn Dio uzas en sia parolo kun vi. La plej bona rilato kun Dio ekestas tie kie

oni estas en “sama ondolongo” kiel Li. “Similaj infanoj plej bone kunludas”, diras la proverbo. Du homoj povas interkompreniĝi, sed birdo kaj homo tamen ne tiel bone povas interkompreniĝi. Se Dio alparolu birdon, estu per alia birdo. Se Li alparolu homon, estu per alia homo. Kiam ni volas paroli kun Dio, ni ne kredu, ke tio estas io, kio povos okazi nur en “la ĉielo”, tio povas okazi tie kie ni iras kaj staras. Dio spertas nin per nia ĉirkaŭaĵo, kaj kiam Li respondu al ni, Li respondas per nia ĉirkaŭaĵo, per nia proksimulo. Kiam oni tion ĉi scias, iĝas pli kompreneble, ke oni amu sian proksimulon kiel sin mem. Estas treege necese por nia feliĉo, ke ni ekamu nian proksimulon, nian ĉirkaŭaĵon, kiuj ja estas la sensiloj de Dio.

12. La ĉiutaga parolo kun Dio

Iam estis tiel, ke la homoj ne havis tiun ĉi sintenon. Tiutempe, mortigi sian proksimulon estis idealo. Mi pensas pri la epoko de la vikingoj. Por la bestoj daŭre estas idealo mortigi, ja eĉ vivnecese. Sed por homoj, kiuj travivis ĉi tiun staton ĝis-naŭze, ne plu estas idealo aŭ vivnecese. Kaj ĉiuj normalaj homoj tiam sopiras al la mala vivo. Sed por ke tiu ĉi sopiro plenumiĝu, estas necese, ke oni lernu koni la rimedojn por tio. Por ke onia propra vivo iĝu alia, oni devas unue sopiri tion. Ne nebule, sed klare. Kiam en viaj pensoj aperas deziro pri io, tiam vi agas en la direkto al la plenumiĝo de viaj deziroj. Tio estas via parolo al Dio. Se vi pensas, deziras kaj agas malĝuste, tiuokaze Dio devas tion rakonti al vi. Se vi faras ion, kaj pensas, ke tio estas ĝusta, kaj tio tamen en la realo estas malĝusta, tiuokaze Dio devas rakonti tion al vi, kaj tio ne povas okazi en pli perfekta kaj bona maniero ol lasi al vi mem sperti la efikojn de via agmaniero.

Nia konscivivo konsistas el ĵonglado per diversaj pensospecoj kaj energioj. La manifestajoj, kiuj estas la rezulto de tiu ĉi mikso de pensospecoj, influas al nia ĉirkaŭaĵo, kiu estas la sensilaro de Dio. Sekve ni tutan tempon korespondas kun Dio. Ni konstante ekscias ion de Dio. Ni iom post iom lernas kompreni ĉion, kio ne estas agrabla. Ni lernos senti, kiel estas, kiam aliaj malĝojas aŭ estas vunditaj. Ĉio, kio okazas, servas al nia plejbono, tiel ke ni finfine atingos ami Dion plenkonscie. La deziro de la tuta homaro nun iras en la direkton krei mondon, en kiu ĉio estas perfekta, kaj nenio perdiĝas, en kiu neniu estas devigita vivi en malriĉeco ktp. Estas tio, kio estas la sopiro kaj celo de la homaro. Ĉi tiuj sopiroj transdoniĝas al Dio per liaj specialaj helpantoj, kaj Dio respondas al la homoj per diversaj okazaĵoj. El tiuj estuloj, kiujn Li havas je sia dispono, Li lasas al tiuj, kiuj kapablas manifesti la mortigan principon, tion fari, kaj al tiuj, kiuj ne plu tion kapablas, Li lasas fari la malon. Per tiu ĉi nova kompreno pri niaj kunestuloj kiel sensiloj de Dio, ni venos al pli intima rilato kun Dio. Ni spertos, ke paroli kun Dio ne nur estas io, kio okazas kaŝite, sed ke ni parolas kun Dio, ĉiufoje kiam ni faras agon al nia proksimulo. Ĉiu estulo, kiu venas en nian sensokampon, estas nia proksimulo. Ju pli ni venas en harmonion kun nia proksimulo, des pli ni venas en harmonion kun Dio. Kiam ni venas en konflikton kun nia proksimulo, tiam en la realo estas Dio, kun kiu ni venas en konflikton. Ĉiufoje kiam ni faras ion eraran, tiam ni spertos doloron. La doloro estas ia “vekhoroĝo”, kiu sonoras atentige, kiam ni survojas erari. Se ni ne aŭdas ĝin aŭ ignoras ĝin, ĝi sonoros pli kaj pli forte, ĝis kiam ni aŭdos ĝin kaj atentos ĝin. Tio ĉi kaŭzas, ke neniu subite kaj tute senatentige povas pereji.

13. “Patro, plenumiĝu ne mia, sed Via dia volo”

Kiam ĉio do estas manifestaĵo de Dio, kiam ĉio estas la kreaĵo de Dio, tio en la realo signifas, ke ni eterne kuŝas en la brakumo de Dio mem. Ni eble ne estas tiuj iloj, kiujn ni deziras esti, kaj kiam tiel estas, ni ekhavas konflikton kun ni mem. Ni devas kompreni, ke la sola, kun kiu ni povas veni en konflikton, estas ni mem. Kiam nin trafas malfacilaĵoj, konfliktoj kaj elreviĝoj, ne kulpas tiu aŭ alia persono; tio okazas ĉar ni en iu maniero ne agis ĝuste. La suferoj nin kondukas al pli profunda rilato al Dio, kaj fine ni vidos Lian aperon, kien ajn ni turnos nian rigardon. Vidi ĉiujn estulojn kiel la sensilojn de Dio, kondukos al akcelita amevoluo, kondukos al tio, ke ni vidos, ke tute ne troviĝas kaŭzo por kritiki tiun aŭ alian; ĉar se oni tiel faras, estas ja Dio, kiun oni kritikis. Tiun tagon, kiam vi rigardos ĉiujn estulojn kiel la sensilojn de Dio, vi ekhavas la saman sintenon kiel Jesuo, kiam li diris: “Patro, plenumiĝu ne mia, sed Via dia volo!” En la lumo de tiu ĉi sinteno oni rigardas ĉion kiel dian, kaj tiam oni ne pensas pri tio, kion oni mem estus farinta. La senco de la vivo estas, ke oni atentu la parolon de Dio. Estus saĝe liberigi sin de la malsaĝa stato preni serioze ĉion malagrablan, kion aliaj faras al oni mem. Tiel longe, kiel oni estas en tiu ĉi stato, oni ne vidas ion alian. Tiun tagon, kiam vi alvenos al stato, en kiu vi povas per rideto akcepti ofendon, la vivo komenciĝos. Vi konas la ordonon, ke oni alturnu ankaŭ la dekstran vangon, kiam iu frapis la maldekstran. Sed oni kompreneble ne prenu tiun ordonon laŭlitere. Se ni havas malamikon, kaj tiu nin frapas sur la dekstran vangon, ni ne simple lasu lin ankaŭ frapi la maldekstran. La ordono signifas, ke ni alturnu nian intelekton. Se iu nin batas, ni ne rebatu. Ni iru nian vojon

aŭ alimaniere lasu lin iri maldekstren, kiam ni iros dekstren aŭ inverse. Se oni tiel faras, oni estas en kontakto kun la plej altaj leĝoj de la vivo. Eĉ tiu, kiu nin batas, estas nia proksimulo kaj parto de Dio. Se ni kondamnas tiun nian proksimumon, ni kondamnas Dion. Rilate al ĉia perforto estas saĝe memori la vortojn de Jesuo, kiam li de la kruco diras: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras!” Tiuj vortoj esprimas la plej altan manifestiĝon de vivkompreno.

14. La tera homo estas preĝe aŭdata de multegaj homoj en la psika sfero

Kiam mi vidas vin, mi vidas la okulojn de Dio en vi. Ĝuste en la sama maniero kiel vi estas memstara rilate al Dio, mi estas memstara rilate al Dio. Vi havas Dion ĉirkaŭ vi, en vi, jes ĉie vi trovas Dion. Vi povas esti en situacio, en kiu vi ne povas ekhavi kontakton kun Dio, t.e., ke vi povas esti en situacio, en kiu neniu konato komprenas vin. Sed kiam neniu konato povas kompreni vin, vi devas serĉi kontakton per aliaj “iloj”, per kiuj vi povas ekhavi kontakton kun Dio. Ĉi tie en la ĉiutaga vivo oni povas esti ĉirkaŭata de homoj, kiuj estas plimalpli for de “la spirita ondolongo”, kiun oni mem reprezentas. Tio ĉi kaŭzas, ke multaj homoj venas en situacion, en kiu ili sentas sin forlasitaj de homoj; ĉie kien ili turnas sin, ili trovas neniun kunsenton. Tiel estas, ke multaj homoj faras sinmortigon. Fari sinmortigon estas io, kio estas tute sensenca, ĉar oni ne estas forlasita de Dio pro tio, ke oni estas forlasita de homoj, kaj oni povas sin turni al Dio en alia maniero ol per homoj. Dio havas multajn aliajn ilojn ol tiuj, kiuj estas videblaj por la homoj. Flanke de la teraj homoj troviĝas multegaj vivaj estuloj en la psika sfero, kiuj sole havas la taskon peri la preĝojn de la teraj homoj pri helpo. Kiam oni volas preĝi, oni povas, kiel estas skribite, “eniri en

sian sekretan ĉambreton”. Sed tion oni ne komprenu laŭlitere. Ne devas esti ĉambro kun kvar muroj kaj pordo, ne estas tio, kio gravas. La celatan “sekretan ĉambreton” ni havas ĉie, kie ne estas homoj. Ni povas prepariĝi tiamaniere, ke ni turnu nian konscion al la nekonata, tie kie ni diras: “Patro Nia, Vi kiu estas en la ĉielo”. Ni ne kredu, ke tiu ĉi preĝo perdiĝas en la aero. Ĝi iras al la psika sfero, en kiu estas multegaj estuloj, kies ĉiutaga vivo konsistas el helpi la homojn, kiuj ne estas helpeblaj en alia maniero. Tiu ĉi helpo okazas en telepatia maniero. Ekzistas estuloj en la spirita sfero, kiuj havas la taskon perinajn preĝojn. Ĉiutage ni ricevas helpon de ĉi tiuj estuloj. Ĉi tiuj estuloj reprezentas ĉiajn spertokampojn, kaj pro tio oni ne povas veni en situacion, en kiu neniu el tiuj ĉi estuloj komprenas onin. Se la estulo kiu “aŭdas” onian preĝon, ne specialigis pri helpi en tiu kampo, en kiu oni bezonas helpon, ĝi alvokas aliajn estulojn, kiuj specialigis pri helpi en ĝuste tiu kampo, en kiu oni havas helpbezonon. Sed ne ĉiam estas tiel, ke la preĝo plenumiĝas, ne ĉiam estas tiel, ke la vivo formos sin tiel, kiel oni mem deziras. Sed tio, kio okazas, estas la plej bona por ni mem.

15. La sperto esti unu kun Dio

En tiu ĉi maniero ni estas en intima rilato kun Dio, kaj la estonta kompreno pri la viva estulo iĝos tia, ke la vivaj estuloj estas sensiloj de Dio en la amaj kampoj samgrade, kiel ili sentas sin unu kun iliaj kunestuloj. Sed sammaniere kiel ekzistas estuloj por estigi amomanifestaĵojn, ekzistas estuloj, kiuj kapablas estigi la malon. Ekzistas ekzemple landoj, en kiuj oni ankoraŭ devas havi ekzekutistojn. Tuj kiam ne plu estas bezono je tio, ili malaperos. Pro tio, ni ne komencu riproĉi aŭ juĝi tiujn, kiuj estas ekzekutistoj. Se ni komencas juĝi, tio estas signo, ke mankas al ni

la kompreno pri ilia misio en la granda konstruproceso, kiu ĉirkaŭas nin. Homoj, kiuj estas ekzekutistoj, estas tio same nature, kiel ni estas tiaj, kiaj ni estas. Se ni iĝas malkontentaj pri la nivelo, sur kiu ni troviĝas, ni nature strebas al nova. Ĉiuj vivaj estuloj, kiuj hodiaŭ ekzistas en la mondo, estas iloj en la refarado de nia tero de materia al pli spirita stato. Ĉio, kion vi vidas, estas ero de grandega malkonstru-kaj konstruproceso. Eble vi hodiaŭ ne povas kompreni, kia la vivo iĝos, kiam ĉiuj havos la sintenon, ke ĉiuj estuloj estas sensiloj de Dio, sed iĝos supermezure diece. Kiam vi havos tiun sintenon, Dio iĝos estulo, kun kiu vi povas paroli, kun kiu vi povas unuiĝi. Sed tio ĉi ne povas okazi, pro tio ke mi diris tion al vi. Tio nur povas okazi pro tio, ke vi mem fojon post fojo adaptas vin vidi la aferon tiel. Vi eniru la pensadon esti cent-elcente tolerema. Se vi faros tion, vi spertos, ke kelkaj ĉeloj en via cerbo malfermiĝos por korespondado. Kiam tiuj ĉi ĉeloj malfermiĝos, tiam vi havos la senton, ke ĉiuj estuloj konsistigas unuon, kaj via propra disradiado fariĝos de tia naturo, ke ĝi unuiĝos kun la disradiado de Dio, kaj vi spertos esti unu kun li.

16. Starante sur la panoramejo de Dio

Estante en kontakto kun Dio, vi ekhavas kontakton kun ĉio. Tiel vi povas rigardi panorame la pure materiajn okazaĵojn, tiel vi leviĝas ĝis la panoramejo de Dio mem, kaj de tie vi vidas, ke ne ekzistas eĉ ombro de motivo por esti netolerema kontraŭ iu aŭ io. De tiu pozicio vi vidas klare, ke ĉio, kio okazas en la mondo, estas la manifestaĵo de Dio mem, kaj tiam vi trankvile povas transdoni al Dio ĉion, kion vi ne ŝatas, kaj kion ŝanĝi ne eblas per via propra povo. La homoj atingos stadion, en kiu ili esploros ĉion, kion ili travivas tre skrupule, kaj vidos, kio estas la plej bona por

ili mem kaj por iliaj ĉirkaŭuloj kun konsidero al la plenumiĝo de iliaj propraj deziroj. Kiam oni staras sur la panoramejo de Dio mem, ne plu troviĝas eraroj en oniaj agoj, oni ĉiam faras la ĝustan, oni ĉiam estas mense agordita por amiasian proksimulon kiel sin mem. Amiasian proksimulon kiel sin mem, ne nur signifas brakumi kaj karesi. La vera amo al la proksimulo neniel rilatas al sentimentaleco. Ĝi konsistas el tio, ĉiam provi kompreni la agmanieron de la proksimulo kaj tial ĉiam lin pardoni, eĉ kiam li faras ion, kio ne kongruas kun la vivleĝoj. Se vi ne kapablas pardoni, vi troviĝas en periodo de spirita stagnado. Vi povas distancigi vin de mensa stato kaj progresi, nur per manifesti

novan kaj pli bonan staton. En la sama grado, kiel vi manifestas novan kaj pli bonan mensan staton, vi leviĝas supren al stadio, en kiu vi povas vidi, ke ĉiuj vivaj estuloj kune estas la eterna vera Dio, kaj tiam vi komprenos la vortojn de Paulus: “En Li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas.”

La artikolo estas referaĵo de prelego, farita de Martinus en februaro 1942. La referaĵo baziĝas sur stenografaĵo de Hans Bonnelycke kaj aliaj. Alineajn titolojn kreis Torben Hedegaard, aprobitaj en la konsilio de Martinus-Instituto 2013.08.09. Unua publikiĝo en “Kontaktbrev nr. 12-13, 1942”. Originala dana titolo estas “Fremtidens syn på det levende væsen”. Eldanigis la artikolon Hokan Lundberg kaj Henning Sato von Rosen kun helpo de pluraj amikoj dum la Esperanto-semajno en Klint somere 2014.



Foto: marguefile.com

Mistiko aŭ scienco?

Demando: Tiel grandaj problemoj kiel ekz. Providenco, reenkarniĝo kaj sen-morteco, ĉu eblas levi ilin el la sfero de mistiko kaj montri ilin kiel realajn kaj nerefuteblajn faktojn aŭ akcepteblajn sciencajn rezultojn, kiuj estas alireblaj por intelekta esplorado konforme al aliaj sciencoj?

Respondo: La incita aŭ intelekta evoluinta kosme konscia observanto povas klarigi la menciitajn problemojn kaj ĉiujn aliajn spiritajn problemojn en formo de sciencaj rezultoj, kiuj en si mem estas nerefuteblaj pruvoj por tiu, kiu povas kompreni la vicon de la analizoj. Sed problemoj aŭ fenomenoj tiel altrangaj kiel tiuj estas la portiloj de la mondstrukturo, kaj sekve ili estos la firma neskebla fundamento de ĉia plej alta kulturkreado. Ili estas fenomenoj, kiuj leviĝas ekster temp- kaj spacdimensiaj pensado kaj konceptado. Tial dokumentado aŭ pruvo pri tiuj temoj en formo de sciencaj rezultoj aŭ spirita scienco devias de la rezultoj de la ordinare konata scienco per tio, ke kiel tiuj ili ne estas rekoneblaj per ordinaraj fizikaj sensoj kaj la sekvanta materiisme influata inteligento.

Ili estas rekoneblaj nur pere de pli alte evoluinta konscieca aŭ spirita strukturo. Sed pli alta spirita strukturo ekzistas ekskluzive kiel rezulto de pli alte evoluinta etika aŭ morala pensado kaj imagokapablo. Kiam la plej altaj misteraj problemoj estas solveblaj nur pere de perceptado bazita sur humaneco kaj amo de vero, do la kaŭzo estas, ke ili ne estas rekte fizike videblaj aŭ sperteblaj, sed nur pere de pensado, intuicio kaj

imagado, alivorte kapabloj kiuj fariĝas perfektaj nur pere de komplete perfekta spirita aŭ mensa suvereneco de estulo. Tio estas do stato, kiu neniel povas ekzisti ĉe tiu estulo aŭ homo, kies pensoj tro altgrade estas regataj aŭ formataj de kontentigo de personaj aŭ egoismaj avidoj. Estulo, kies pensfunkcio estas ilo por ĉiuspecaj egoismaj avidoj, neniel povas sperti aŭ elformi la absolutan analizon de la eterna realo aŭ vero.

La malaltaj bestaj aŭ egoismaj avidoj ne povas erarigi la fizikan perceptadon. Ŝtelisto vidas arbon same bone kiel faras honesta homo. La samo validas por la fizika sunbrilo. Bandito perceptas ĝin same bone kiel faras sanktulo. La morala strukturo de la homo neniel influas tiajn perceptoformojn. Nur tie, kie la estulo traktas la travivaĵon aŭ perceptadon sur la intelekta aŭ spirita nivelo, la morala strukturo fariĝas kunefika faktoro en la kreado de la fina rezulto en la spertado. Tiel longe kiel la fortaj egoismaj avidoj aŭ deziroj regas la menson, ĝi formas sian spiritan travivadon aŭ perceptadon kaj sekve siajn spertojn, sian inteligenton aŭ imagokapablon pli favore al atingo de kontentigo de tiuj avidoj ol por vere malkovri la veron. Sekve ĝia malkovro de la vero fariĝas bildo pli de ĝia mensa malforto aŭ nestabileco ol de la reala vero. Tial nur estulo komplete levita aŭ altigita super ĉiuj egoismaj avidoj en sia konscio povas percepti kaj komuniki la veron en ĝia brila pura formo.

Sekve aperas du specoj de sensaroj: unu fizika kaj unu spirita. Pere de la fizika sensaro la estulo perceptas nur la fizikajn reagojn kaj ties analizojn pere

de la inteligento, kaj tio formas la bazon por la moderna materiisma scienco. Post tio venas la spirita perceptado, kiu estas bazita sur intuicio kaj komplete malego-isma pensado kaj imagokapablo. Estas ĝuste tiu lasta perceptoformo, sur kiu baziĝos la eterna mondbildo kaj la nun komenciĝanta kulturkreado de nova mondepoko kaj la sekvanta daŭra paco sur la tero.

Ĉi tie montriĝas evidente, ke la plej altaj rezultoj de la vivmistero ne estas pruveblaj por la materiisma aŭ egoisma homo, ĉar ĝia spirita strukturo estas ligita al la kaptiloj de ĝiaj egoismaj

avidoj, kiuj devigas la estulon formi siajn pensojn kaj konceptojn favore al ili. Alie estas por la liberigita aŭ suverene pensanta spirita homo. Libera de ĉiuj egoismaj avidoj ĝia perceptointereso povas havi nur unu solan celon, nome malkovron de la vero en ties absoluta dia brila realo. Kaj por estuloj, kiuj progresis por aspiri tiun brilan dignon aŭ tiun vivon en vero kaj realo, la analizoj de la vivmistero estas teorie pruveblaj, kaj la grandaj realaĵoj montriĝas faktoj.

Letero n-ro 8/1950 Trad. Ib Schleicher



Eliro el la kongresejo en Bulonjo sur Maro en 1905



De la unua al la centa. De Boulogne-sur-Mer al Lille

de Javier Romero

La distanco inter Boulogne-sur-Mer kaj Lille estas nur 102 kilometroj. Iom pli ol la sama nombro de UK-oj, kiujn oni celebros ĉi venontan someron en Lille, 25 julio – 1 augsuto 2015. Ja inter Boulogne-sur-Mer kaj Lille troviĝas granda kaj unika historio, nome la historio de la Esperanto-Movado, la historio de centoda Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Esperanto naskiĝis la 26-an de julio en la jaro 1887 danke al la eldono de la “Unua Libro”, la 42-paĝa broŝuro, *Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro*. Ĝia aŭtoro, L.L. Zamenhof, uzis la pseŭdonimon “D-ro Esperanto” por montri, jam ekde la komenco, la gravecon de la nova lingvo kaj ne de la aŭtoro.

En la jaro 1905 Esperanto aperis antaŭ la mondo pere de la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer, Francio. Tie kaj tiam komenciĝis la videbla internacia manifestiĝo de la esperantistaro. La 5-an de aŭgusto de 1905, L.L. Zamenhof, D-ro Esperanto, malfermis la unuan Universalan Kongreson pere de ĉi tiuj vortoj:

*“Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!
– Mi salutas vin, karaj samideanoj, frat-
toj kaj fratinoj el la granda tutmonda
homa familio, kiuj kunvenis el landoj
proksimaj kaj malproksimaj, el la plej
diversaj regnoj de la mondo, por frate
premi al si reciproke la manojn pro la
nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin li-
gas. Mi salutas vin ankaŭ, glora lando*

*Francujo kaj bela urbo “Bulonjo-sur-
Maro”, kiuj bonvole oferis gastamon al
nia kongreso (...) Sankta estas por ni la
hodiaŭa tago. Modesta estas nia kun-
veno; la mondo ekstera ne multe scias
pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj
en nia kunveno, ne flugos telegrafe al
ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne
kunvenis regnestroj, nek ministroj, por
ŝanĝi la politikan karton de la mondo,
ne brilas luksaj vestoj kaj multego da
imponantaj ordenoj en nia salono, ne
bruas pafilejoj ĉirkaŭ la modesta domo,
en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de
nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj
tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo,
sed senteblaj por ĉiu animo sentema:
ĝi estas la sono de io granda, kio nun
naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj
fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la
animo ilin sentas; ili estas imagoj de
tempo estonta, de tempo tute nova. La
fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos
kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj
ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.”*

Mi miris kiam mi legis unufoje ĉi tiujn misterajn vortojn: “La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.” Pri kiuj fantomoj Zamenhof estis parolanta? Kiuj estas tiuj estontaj imagoj? Kaj iomete poste en sia parolado, Zamenhof daŭrigas “Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi

unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion: sed tio ĉi estis nur revo. (...) Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi.

Ni vidas kiel la fantomoj iom post iom korpiĝas sur la Tero. Jam pasis 110 jaroj ekde la unua parolado de L.L. Zamenhof. Vivon post vivo vivaj estuloj enkarniĝas sur la Tero. Ankoraŭ mankas iom da tempo por ke Esperanto fariĝu la reala internacia lingvo. Grandaj internaciaj krizoj vekos homojn de sia malluma kaj materia sonĝo. En la antaŭa Kosmos en Esperanto, n-ro 1, 2014, Martinus parolas al ni pri la nova mondkulturo post ragnaroko. “Fariĝos granda transformiĝo, la plej granda, kiu povus okazi al la popolo de la Tero”, diras Martinus. “Homoj ne loĝos en propraj domoj, sed konstruos palacojn, kie ili organizos komunajn aranĝojn, manĝadojn, distradon kaj kinejojn”. Ni povas imagi kaj antaŭvidi ke Esperanto estos la komuna lingvo en tiuj palacoj.

“Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi.”

Eble, ni ĉiuj estas tiuj fantomoj, tiuj, kiuj nun vivas sur la fizika Tero kaj

tiuj, kiuj reenkarniĝos en venontaj generacioj. Ni vidis kiel Esperanto venis al la Tero pere de elstara kaj tre humila homo. Esperanto estis elektita por fariĝi la internacia lingvo. Ni ĉiuj, teraj homoj “denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion.”

La semo estis plantita. Zamenhof estis grandega pacosemanto, kaj la verda standardo multe flagris en centoj da landoj tra la tuta mondo dum la lastaj 128 jaroj. La lingvo kreskas malrapide, en ondoj, sed tamen en longa perspektivo sekure kaj forte. Ĉi-jare, la esperantistoj celebros la centan UK-on inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto en Lille, je 102 kilometroj for de Boulogne-sur-Mer. Ŝajnas al mi ke unu ciklo fermiĝos kaj nova komenciĝos en kaj post Lille. La homaro vojaĝas direkte al la kerno de la dudek-unua jarcento, kie tre eble komenciĝos “granda transformiĝo, la plej granda, kiu povus okazi al la popolo de la Tero”.

Nova monda kulturo naskiĝos sur la Tero. Esperanto estas parto de tiu nova kulturo. Oni diras ke Esperanto estas la



Kongresanaro en la unua kongreso 1905, Bulonjo sur Maro

lingvo de la amo. Esperanto estas parto de la nova moralo. Martinus montras al ni ke la amo estos la nova monda moralo. La nova kulturo estos bazita sur toleremo, altruismo, pardonado, internacia kunlaborado, naturprotektado, vegana nutrado, komunaj vivloĝejoj aŭ palacoj, ktp. Kaj en tiu nova mondo oni parolos Esperanton, la neŭtralan lingvon de internacia interkompreniĝo. Uzante la vortojn de Zamenhof en futura formo, ni, homoj de la Tero, estos “fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havos ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn idealojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj helpos unu la alian kaj laboros kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio”. (Vidu la unuan paroladon de Zamenhof.)

La pasinta, 99-a UK en 2014 en Bonae-ro, Argentino, havis la kongresan temon *Ĉu la nepoj nin benos?* Ĝi aludas al la fama poemo de Zamenhof, “La Vojo”:

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
ni semas kaj semas konstante.
“Ho, ĉesu!” mokante la homoj admonas, –
“Ne ĉesu, ne ĉesu!” en kor' al ni sonas:
“Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
se vi paciencie eltenos”.
Semi kaj semi senĉese. “Obstine
antaŭen!”*

Martinus klarigas al ni pri “la bona tero” por la semoj de “la nova kosma mondimpulso”. (Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. Libro 12B, Ĉapitro 17-a) Ne ĉiuj homoj emas lerni Esperanton. Ne ĉiuj homoj interesiĝas pri la spirita scienco de Martinus.

Tio ne gravas, ĉar nun vere estas la tempo de semado. La evoluo daŭrigos sian kurson kaj finfine ĉiuj homoj atingos la perfektan homregnon. Martinus antaŭvidis Esperanton kiel la internacian lingvon. Ĉi-jare ni ne nur celebras jubilean Universalan Kongreson sed ni ankaŭ celebras la 50-an datrevenon de Esperanto kiel oficiala internacia lingvo de la Instituto de Martinus. La 5-an de aprilo de 1965, la estraro decidis en sia kunveno ke Esperanto estu la oficiala internacia lingvo de la Instituto kaj de ties internacia organizo.

Jes, Esperanto kaj la Kosmologio de Martinus kunfandiĝos pli kaj pli. “Post 500 jaroj estos tre granda kristo-politiko en la mondo”, diras Martinus. Mi ŝatas imagi ke jam en tiu epoko ĉiuj teraj infanoj legos la spiritan scienccon de Martinus en la sama internacia lingvo, Esperanto.

“Niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.”

Ja...ĉi-jare ni estas en festo!



“... la revo komencas realiĝi...”



La fama organizinto Michaux kaj Zamenhof en 2005.

Manskribita poemo de Zamenhof sur la foto:
*Kion disigis ĉe unu miljaro
 Tion kunigis Bulonjo ĉe l'Maro
 Aŭgusto 1905*

L. Zamenhof

LA KOSMA BRILO DE LA TERGLOBO

Daŭrigo de simbolklarigo de simbolo n-ro 27

Malsupre en la simbolo ni vidas grizan figuron. Supre ĝi estas formita kiel ŝtupoj, kiuj etendiĝas de maldekstre kaj supren dekstren. Tiuj ŝtupoj simbolas, ke la tergloblo troviĝas en evolustadioj en la kosma spiralciklo same kiel ĉiuj aliaj vivaj estuloj. Ŝtupo n-ro 1 estas la plantoregno. N-ro 2 estas la bestoregno, al kiu apartenas la nefina tera homo. N-ro 3 estas la vera homregno. N-ro 4 estas la saĝoregno. N-ro 5 estas la dia mondo. N-ro 6 estas la beatoregno. En la simbolo ni vidas, ke sur sia evoluvojo en sia spiralciklo la tergloblo troviĝas ĝuste en ŝtupo n-ro 2, kio signifas: en la bestoregno. Ĝi sekve survojas por

fariĝi homplanedo, kaj post tio por fariĝi pure spirita planedo, kiel antaŭe ĝi estis planto- kaj mineralplanedo. Por ni la tergloblo ja estas makrokosma viva estulo, kaj sekve ĝi estas submetita al la spiralcikla progresigo de la novigo kaj konservado de la eterna vivtravivadkapablo de la vivaj estuloj.

Inter la du horizontalaj violkoloraj linioj ni vidas la rilaton de la tergloblo al kulmino de la spiralciklo en lumo, kaj la rilaton al kulmino en mallumo en la spiralciklo. Ni vidas la nigran figuron, kiu kulminas en ŝtupo n-ro 2, la bestoregno. Kaj ni vidas la blankan figuron, kiu simbolas la lumon, kaj kiu sur tiu sama

ŝtupo estas en sia latentata aŭ plej malgranda funkcio. Ni vidas, ke tie la terĝlobo ĵus trapasis la kulminon de la mallumo kaj survojas al la kreskanta lumo. Tial ĝi nun taŭgas kiel loĝloko por homoj, kiuj troviĝas en la funkcionoj de la kataklismaj epokoj, kaj kiuj troviĝas en la rezultinta komenciĝanta kosma epoko, en kiu la homoco en la homoj eksuperos la bestan naturon en ilia konscio. Per tio ili eniros en sian lastan evoluepokon de besto al homo, kaj tie ili ricevos kosman konscion kaj fariĝos finaj homoj laŭ la bildo de Dio simila al li. (Gen. 1.26-27). Per tio ili iom post iom konsistigos la komplete perfektan homregnon sur la tero, kaj en la simbolo tio estas simbolita per ŝtupo n-ro 3.

La blanka figuro en la ŝtuparo etendiĝas de ŝtupo n-ro 6, la minerala regno, kaj antaŭen tra ŝtupo n-ro 1, la plantoregno, tra ŝtupo n-ro 2, la bestoregno, kaj tuŝas la limon ĉe ŝtupo n-ro 3, la vera homregno. Tiu blanka figuro simbolas la limon de la konscio de la nefina tera homaro. La regiono de la konscio aŭ scio de la nefina tera homaro enhavas do nur scion pri la fizika regiono de la minerala, planta kaj besta regnoj. La nefinaj aŭ ankoraŭ bestaj homoj ne multe konas la spiritajn mondojn: la veran homregnon, la saĝoregnon, la dian mondon kaj la beatoregnon. La nefina homaro sekve efektive havas nur materian scion, kaj ĝi estas scio nur pri minerala, vegetala kaj animala materioj. Pri la viva estulo kaj ĝiaj kosmaj talento kaj strukturo, kiuj formas kaj regas la fizikan materion, la nefina homaro ne havas absolutan realan scion. Efektive ĝi ja ne konas “la vivan ion” de la vivaj estuloj. Ĝi konas nur tiun organismon aŭ materikombinon, kiu estas formita kaj regata de “tiu viva io”. Ĝuste “tiu viva io” estas la mio kaj ĝia superkonscio aŭ la absolute “eterna io” malantaŭ ĉiaj videbligo kaj kreado. Se ne per la mondliberigado Dio donus al la tera homaro la kosman scion pri la vere viva io malantaŭ ĉiaj fizikaj manifestado kaj kreado, kaj per tio gvidus ĝin, tiam la homaro neniam povus atingi ekster la regionon de la bestoregno. Sed laŭ la evoluo de humaneco kaj amo la homoj ricevos la kosman kapablon, la intuicion. Per tiu kapablo la estulo povos travivi kaj orienti sin en tiu spirita aŭ kosma universo, kiu estas la eterna fundamento de la vivo, dum la fizika flanko de tiu universo estas nur iluzia, kiel ni jam vidis en la antaŭaj analizoj.

Klarigo pri simbolo n-ro 27 La Eterna Mondbildo, volumo 3. Traduko Ib Schleicher en 1999

INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk

esperanto@martinus.dk

shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Mathias Dalmose.

Kompostado: Dan Elhåuge.

La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba
permeso.

Presita de Martinus Institut

ISSN 1600 4116.



Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en La Tria Testamento "ĉio estas tre bona" el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas "alturni ankaŭ la alian vangon" kaj "ami sian proksimulon kiel sin mem" scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.



Eo-semajno en Martinus-Centro en 2015

Inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 2015 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla, germana kaj hispana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondoj, posttagmeze estos konversaciaj rondoj. En la vespero estos prelego en Esperanto aŭ distra programo, ankaŭ estos teo kaj kukoj en la restoracio *Terrassen*.

Kiel trovi Martinus-Centron en Klint

De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon, al Højby aŭ Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per aŭtobuso n-ro 563 aŭ per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.



Martinus-Centro